Teachers and others intending to go to the Conference are requested to intimate the fact as soon as possible to Mr. Page. A questionnaire will be sent to Group Secretaries early in the spring with the object of eliciting full information as to the experiences of teaching Esperanto in schools in their districts. In the meantime the Committee is preparing a Memorial to the League of Nations for signature by men of influence throughout the country, and Secretaries of Groups will be asked to assist in obtaining signatures of their local dignitaries.

In connection with the above, the Council has empowered the Special Committee to raise funds for its purposes. It is anticipated that the cost of sending a deputation of two or three experts to the Conference, of printing and circulating the Memorial for influential signatures, and of other necessary work, will be about £100, and assistance from all able to contribute towards this outlay will be heartily welcomed. Subscriptions should be sent without delay to the Hon. Treasurer of the B.E.A., 17 Hart Street, London, W.C. 1, marked "Geneva Conference Fund."

Those concerned with the arrangements in Geneva are looking to British Esperantists for very useful work on this occasion, and the results of the enterprise, if it is properly financed, will be momentous and far reaching.

KRONIKO.

Reports for this column should be sent to the Editor as promptly as possible. They may be in either English or Esperanto, but should be clearly and concisely worded.

London : U.E.A.—The Annual Meeting of the London Members of this Association took place at Morley College on November 12th. In the absence of Mr. Philip Kay and Mr. Bredall the Chair was taken by Mr. Robert Robertson. The Annual Report of the Secretary, Mr. Epton, was unanimously approved, and a series of interesting speeches then followed. Mr. Blaise explained the embarrassing financial position of the U.E.A., due principally to the difficulty of collecting subscriptions from countries suffering through the present rates of exchange,—a loss of support which it was not easy to compensate for in any other direction. Mrs. Blaise spoke on the relation of Esperanto to the League of Nations, and evoked much interest and applause, whilst Mr. Edmonds explained arrangements for the British Congress to be held in London at Whitsuntide of the present year, and asked for the help of all Esperantists present in making the gathering a brilliant success.

All London Esperantists interested in the work of the Association should obtain particulars from the Secretary, Mr. H. A. Epton, 17, Hart St., W.C. 1.

Edinburgh.—La Societo raportas jene pri lastatempa agado:—"La programeroj ĉe la ĉiusemajnaj kunvenoj kovris multajn temojn, interesajn kaj instruplenajn, sed ĉiam la muziko kaptas la plej grandan aŭdantaron. La koncerto, aranĝita de F-ino R. B. Simpson, okzainta la 30an de Novembro, konsistis tute el kantoj tradukitaj de F-ino A. B. Deans, nia poetino. La erojn oni prezentis kiel solaĵoj, duete, kaj ankaŭ deklame, kaj kelkaj estis kantataj publike por la unua fojo.

"Ekster nia propra rondo kelkaj propagandaj paroloj estis aranĝitaj. Ĉe la Y.M.C.A. la 13an de Oktobro nia Prezidanto faris al granda aŭdantaro paroladon pri Ĉehoslovakio, ilustritan per lumbildo. Poste laŭ peto de kelkaj societoj li ripetis la saman paroladon en diversaj kvartaloj de la urbo. Sro. Wight ankaŭ faris propagandan paroladon pri Bruges (kun lumbildoj) al la Literatura Societo ĉe la lernejo de George Heriot. Pli ol cent junuloj de 15-18 jaroj tre atente aŭskultis, kaj montris grandan intereson.

"Estas kontentige, ke denove policana kurso restariĝis, kaj ke la kursoj sub la aŭspicioj de St. Cuthbert's Co-operative Association kaj la Labour College ankaŭ sukcese daŭras."

Bournemouth.—Sekve de la lastatempa agado de la Grupo, pluaj lekcioj pri nia lingvo estas faritaj en la urbo kaj aliaj estas aranĝitaj. La Grupo nun kreskis ĝis 60 anoj. Depost Oktobro estas venditaj la jenaj : 120 *Esperanto Manual*, 30 *Edinburgh Dictionary*, kaj pli ol 30 *Slilosoj*.

Liverpool.—Jus fondiĝis en tiu ĉi urbo *Asocio de Diplomitoj Esperantistaj*, kies celoj estas : (a) krei rondon de kapablaj Diplomitoj, kiuj povos entrepreni la instruon de la lingvo en la regiono, (b) interŝangi ideojn rilate al la instruo de la lingvo, (c) diskuti lingvajn punktojn, kaj (d) prikonsideri la rajtojn kaj privilegiojn de la anoj ĉiurilate. Prof. W. E. Collinson, M.A., Ph.D., estis elektita konstanta Prezidanto, kaj la Sekretario estas S-ro R. Prys Griffiths, F.B.E.A., 57 Ramillies Road, Sefton Park, Liverpool, ĉe kiu kondiĉoj de membreco estas haveblaj.

Coatbridge.—The following interesting particulars have been received from Miss Watson, the teacher of the Esperanto Class in Blairhill Public School :—"The experiment was started a little more than a year ago, and at the present time 58 boys, whose ages range from 10 to 12 years, receive instruction. The boys thoroughly enjoy the study of the language and are making very good progress. They are corresponding with *lernantoj* in Germany, Czechoslovakia, Finland and Spain."

Uxbridge.—An Esperanto Group has recently been formed in this town, meeting at 6 p.m. on Sundays at the Friends' Meeting House opposite the Metropolitan Railway Station. The Secretary is Mr. F. Bradbury.

Zamenhofa Tago.—Multaj Grupoj tra la lando festis la 15an de Decembro, kaj diversaj interesaj raportoj (ne aperigeblaj, pro manko de spaco) estas ricevitaj. Aparte brila festo okazis en Liverpool, kiam ĉeestis cent personoj kaj parolis aŭ kantis multaj konataj samideanoj. Tiaj ĉiujaraj solenoj de la nasko de la Majstro ja donas bonan okazon por la disvastigo kaj vigligo de nia afero !

COMING EVENTS.

Divine Service in Esperanto will be held on Sundays, January 8th and February 12th, at 3.15 p.m., in St. George's Church, Hart Street, London, W.C. 1. Tea in Elizabeth's Tea Rooms, 16 Hart Street, at 4.30.

London Club.—On Friday, January 13th, the Club will hold a *Novjara Festo* at St. Bride's Institute, Ludgate Circus, commencing at 7.30 p.m., when all Esperantists and friends are heartily invited to be present. Refresh-

ments at moderate prices will be served during the evening. On Friday, January 20th, Mr. E. E. Yelland will commence a new elementary course of instruction, and intending students are invited to take advantage of this opportunity. The Secretary of the Club, Mr. H. Boll, of 58, Cricklewood Lane, N.W. 2, will be pleased to answer any enquiries and to forward a copy of the Club Programme for the next three months.

Dimanĉa Rondo.—Every Sunday at 3.30 p.m. at 12 South Place, Moorgate Street, London, E.C. 2. Informal conversational practice for beginners, singing, short addresses and discussions in Esperanto. Visitors are cordially invited. Refreshments provided at a nominal charge. Organiser : A. W. Bradbrook, 9 Cutcombe Mansions, London, S.E. 5.

National Esperanto Bazaar.—This organisation, which is under the patronage of the President of the B.E.A. and other prominent Esperantists throughout the country, has been set up to assist the new Premises Fund of the Association, established with a view to the securing of suitable office accommodation when it becomes desirable to vacate the premises in Hart Street. It is the intention of the Organising Committee to hold a Bazaar during the British Esperanto Congress in London next Whitsuntide, and contributions in the form either of cash or useful articles will be gratefully accepted. The cash will be used to meet working expenses and to purchase material for making up into goods for sale. All who can help are asked to write to the Hon. Secretary, Mrs. Julia Epton, 17 Chatsworth Road, London, E. 5.

(In connection with the above, an "Ideal" typewriter, with standard keyboard and Esperanto accents, is offered for sale by Mr. J. Bredall, at the price of £10 10s., which amount when received will be handed to the Bazaar Committee as a donation. The machine, which is in excellent condition, can be seen at the offices of the B.E.A., 17 Hart Street, London, W.C. 1.)

Midland Federation.—The next Conference will be held in the Cooperative Buildings, Leicester, on January 21st. Details can be obtained from Mrs. Hailstone, Tile Hill Lane, Coventry.

South-Western Federation.—A meeting will be held at Bristol on Saturday afternoon, January 14th, to discuss the formation of a Federation for the south-western counties of England. All who hope to be present should immediately obtain particulars from Miss E. Hogg, Chalice Well, Glastonbury.

Lancashire and Cheshire Federation.—The 54th Quarterly Conference and the General Meeting of this Federation will be held in the Town Hall, St. Helens, on January 28th. After an official welcome by the Mayor (Councillor R. Ellison), the election of Officers for 1922 will take place. The Conference will be followed by a tea in the Cooperative Hall, Baldwin Street, at 5.30; from 6 to 8 o'clock there will be music and dancing, and at 8 a public Propaganda Meeting will be held, at which the speakers will be Prof. W. E. Collinson, M.A., Ph.D., of Liverpool University, and Mr. G. R. Griffiths. The St. Helens *samideanoj* are arranging to provide hotel accommodation (at 6/6 for bed and breakfast) for those who wish to stay overnight. For further details apply to S-ro Henthorne, 65 Waterdale Crescent, St. Helens.

ESPERANTO PROGRESS ABROAD.

Australasia.—The last Annual Report of the Australasian Esperanto Association gives evidence of encouraging progress. Much good is expected to result from the visit of Messrs. Hudson, Pyke and Rawson to the Prague Congress in August last, and their travels through several countries of Europe by the help of Esperanto. Messrs. Pyke and Rawson have now returned to Australia to give the Association the benefit of their experiences. On the way to Europe, Mr. Hudson visited Japan and enjoyed a stay of three months there, experiencing much kindness and hospitality at the hands of the *samideanoj*.

Austria.—It has been arranged to hold an Esperanto Congress and Exhibition at Salzburg on March 25th and 26th next, and the organisers will be pleased to receive any *Esperantajoj* likely to be of interest for display on this occasion. If so desired the articles will be returned to the senders. All communications should be addressed to S-ro Ferd. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.

Poland.—The authorities of Bydgoszcz (Bromberg) have decided to set up an Esperanto Section in the Municipal Library, regarding which the following has been received from the Librarian, Prof. L. Kronenberg:—“La Urba Biblioteko enhavas ĉirkaŭ 60,000 librojn, kiuj estas ne nur legataj en Bydgoszcz kaj ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ pruntataj al sciencistoj, verkistoj kaj profesoroj en tuta Polujo. Ĉar la aĉetado de libroj en eksterlando estas nun por ni nebla pro la malfavora kurzo de pola mono, mi petas elkore ĉiujn

eldonantojn, presistojn, verkistojn, propagandistojn kaj societojn Esperantajn, ke ili bonvolu sendi finlegitajn aŭ nebezonatajn librojn al la adreso: *Urba Biblioteko en Bydgoszcz, Polujo*. Pro la sendotaj libroj mi jam nun kore antaŭdankas. Oni ne devas sendi nur librojn en Esperanto, sed ankaŭ pri Esperanto en ĉiu lingvo nacia. Ariginte la libraron Esperantan kaj pri-esperantan mi aranĝos en Bydgoszcz grandan ekspozicion, kaj tiucele oni bonvolu ankaŭ sendadi ilustritajn poštarktojn kun markoj sur ilustrita flanko. La redakcioj bonvolu sendadi siajn gazetojn.”

Czechoslovakia.—The Ministry of Railways in the Republic is actively encouraging the study of Esperanto among the staff, and has pointed out that while all foreign language study is to be recommended, Esperanto has the great advantage of easy acquirement. In connection with this development the authorities of the Olomouc Railway District have announced that a knowledge of Esperanto shall be taken into account in selecting candidates for posts, and that (other things being equal) preference will be given to those who have learnt the language.

Spain.—The Esperanto Federation of Catalonia recently held its 9th Congress at Gerona, uniting with this festival the 8th *Internaciaj Floraj Ludoj*, for which literary contributions had been sent in from 18 different countries. Divine Service with a sermon in Esperanto was held during the Congress in the ancient Church of St. Pere de Galligans, whilst other functions included an official reception by the Mayor of Gerona, a very enjoyable banquet, and various excursions to places of interest. The next Congress of the Federation will be held at Manresa.

Russia.—In November last a representative gathering of Esperantists from several Governments of Northern Russia was held in Petrograd, at which questions were discussed relating to the organisation of propaganda and other matters of interest. Those present were drawn from a number of different political parties and professions (including the Civil Service and the railway and postal staffs). A Committee was formed with the view of establishing a North Russian Federation. All interested should write to the Secretary, S-ro Henriko Ĉaće, Italianskaja 31, Petrograd.

Japan.—Regarding the Japanese Esperanto Congress lately held at Tokyo, a correspondent writes:—“The fluent speeches in Esperanto and the translation from extempore Esperanto speeches into Japanese at the public meetings

were particularly striking features, which must have impressed the non-Esperantists present . . . In Japan there are many young Esperantists, principally University and Higher School students, who know the language thoroughly, are full of enthusiasm, and are working hard for the cause." As readers of the *British Esperantist* know, a large number of Esperanto books are sent to Japan from the B.E.A. headquarters; and further proof (if it were necessary) is continually being given that the language is well established in this progressive land of the Far East.

TRA LA LIBRARO.

Tie ĉi aperas priskriboj de verkoj novaj kaj malnovaj. A ĉetantoj sin turnu al la B.E.A. aŭ ĝiaj prezlistoj.

Tri Angloj Alilande, de John Merchant. (62 paĝoj. *Eldonita de la B.E.A.*). La apero de nova eldono de tiu ĉi konata verko sendube ĝojigos malnovajn legantojn, kaj multe helpos al kursanoj kaj aliaj studentoj dezirantaj malpezan rakonton, kiu ne nur amuzos ilin se ankaŭ tre bone pligrandigos ilian scion de la lingvo. Ili sekvos kun plezuro la gajigajn aventurojn de la fama trio—la modesta Brown, la senĝena Robinson, kaj la amindumema Morris—en fremdaj landoj; kaj konstatos, ke Esperanto certe bonege taŭgas kiel lingvo de ŝercado kaj humoro. Ni nur citu unu mallongan pecon, en kiu ni vidas Robinson (kiu pretendas scion de la franca lingvo) funkcianta kiel interpretisto dum ekskursio en Bruselo :—

"Rigardu dekstren," diris la gvidisto, "kaj vi vidos la Domon de la Reĝo, konstruitan ĉirkaŭ la jaro mil kvintdek kvar, kiu ricevis sian nomon pro tio, ke ĝi estis la renkontejo de la reĝa konsilantaro."

"Kontraŭ ni," tradukis Robinson, "estas la domo de la reĝo, nomita tiamaniere, ĉar la reĝo estis mortigita en ĝi, en 1514, de la reĝa konsilantaro."

"Tie vi vidas la katedralon de Ste. Gudule, la ĉefglorajon de Bruselo, konstruitan laŭ la germana gotika stilo. Ĝi estas longa je 355 futoj kaj larĝa je 166 futoj."

"La katedralo de Ste. Gudule," diris Robinson, "la ĉefpreĝejo de Bruselo, estis konstruita de Germano nomita Gotika, antaŭ 350 jaroj, kaj havas larĝajn seĝojn por 106 personoj."

"Cent ses personoj?" demandis Fraŭlino Smart. "Ĉu li ne eraris?"

"Eble," respondis Robinson,

Songo de Someromeza Nokto de Shakespeare, tradukita de Louise Briggs. (70 paĝoj. *Eldonita de la Brita Literatura kaj Debata Societo*). Tiu ĉi verko estas grava aldono al nia klasika literaturo. La mond fama komedio de la granda dramisto tie ĉi prezentigas en ĉarma kaj fidela traduko, rekomendinda al ĉiu Esperantisto. Tre laŭdinda estas la lerta maniero en kiu la tradukinto plenumis la malfacilan taskon, prezenti en la internacia lingvo ridindajojn kaj ŝercojn kiuj en la originalo dependas de nuancoj de la angla lingvo, anglaj idiotismoj, aŭ erara uzo de anglaj vortoj—ekzemple, ĉe la absurdulo Bottom. La belaj fantazioj de la originalo ankaŭ trafe transiĝis al la traduko. En la plej konataj pecoj oni trovas allogan reprodukton de la anglaĵo, kaj citinda estas la jena traduko de fama eldiro de la Duko Teseo :—

Amanto, frenezul', poeto estas
el la imago tute kunmetitaj :
pli multe da diabloj unu vidas
ol la infero vasta povas teni,—
ĉi tiu estas frenezul'; amanto,
egale stulta, vidas en la frunto
de ciganin' belecon de Heleno;
l'okulo de poeto, turnigante
en forta frenezeco, ekrigardas
de la ĉiel' al ter', de ter' ĉielen;
kaj, dum la fantazio enkorpigas
aferojn nekonatajn, la poeto
per sia plumo al nula' aera
aldonas formon, nomon, kaj loĝejon.

Kaj el la ridindaj eldiroj de Bottom ni citu :—"Mi kredis esti,—kaj mi kredis havi,—sed homo estas nur arlekeno, se li pretendas diri, kion mi kredis havi. La homa okulo ne aŭdis, la homa orelo ne vidis, la homa mano ne povas gustumi, nek lango imagi, nek koro raporti, kia estis mia ŝongo . . ."

La Eksperimento de Eccles, de Elizabeth Hogg. (24 paĝoj. *Eldonita de la B.E.A.*). Al tiu trafo libreto S-ro W. M. Page kontribuis utilan antaŭparolon pri la cirkonstancoj de la ciekonata Eksperimento farita en la angla urbo Eccles en 1916–1917, kaj pri ĝia sekvo, nome la nun daŭrigata instruado de Esperanto en la lernejo sub la aŭspicioj de la loka Edukada Aŭtoritato, kun la aprobo de la registara Departamento de Edukado. La verketo mem konsistas el detaloj pri la metodo de instruado kaj la programo de laboro uzitaj de F-ino Hogg, unu el la koncernitaj instruistinoj; kaj ĝi certe estos tre utila al instruantoj aŭ instruontoj de Esperanto, kiuj povos uzi la metodon kiel bazon por instruado eĉ al plenaĝuloj. La verketo estas tute en Esperanto kaj tial trafo tutmondan legantaron.

TRA LA GAZETARO.

Pri prezoj de abono, k.t.p., oni sin turnu al la B.E.A.

Esperanto ne estas nur la organo de la U.E.A., sed ankaŭ tre leginda gazeto de tutmonda intereso. Ĉiam bele presita, kaj kun enhavo ampleksanta ne nur la praktikan sed la literaturan kaj intelektan flankojn de nia movado, ĝi estas inda je la atento de ĉiu Esperantisto. Iom nova fako estas tiu pri ŝakproblemoj, kiu sendube altiros multajn fervorajn adeptojn de ŝakludo. Inter aliaj artikoloj en la lastaj numeroj estas notindaj tiu pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj (kun portreto de Lord Robert Cecil, aŭtografita en Esperanto), kaj alia pri la sama temo sed tuŝanta la subtenon de nia lingvo ĉe la Internacia Labora Oficejo, kies estraro jam alprenis la lingvon por certaj uzoj. En la decembra numero aperis anonco pri la grava Konferenco, okazonta en Genevo en Aprilo, 1922, rilate al la raporto pri Esperanto en la Lernejoj preparata (laŭ decido de la Ligo) por diskutado ĉe la Kunveno de la Ligo pli malfrue en la jaro.

Esperanta Finnlando.—Inter la plej bele presitaj kaj zorge redaktataj naciaj organoj, la jena certe estas mencinda. Nuntempe ĝi donas ĉiononate la lastajn detalojn pri la venonta Universala Kongreso, sed krom tio, ankaŭ ĉarmajn artikolojn (ofte kun bildoj) pri Finlando mem kaj aliaj interesaj temoj. La tuta enhavo estas en Esperanto, do internacie legebla.

Literaturo (No. 12).—Per la jena numero, la gazeto finas sian trian jaron de vivo. La numero enhavas, inter aliaj rakontoj kaj artikoloj, aparte interesan (kaj ankaŭ amuzan) priskribon de la uzado de Esperanto ĉe la infanoj de S-ro M. C. Butler, kiu artikolo sendube interesos legantojn de pli ol unu vidpunkto. Kun ĉiu ekzemplero de la numero oni ricevas belan portreton de la infanoj mem. Notinda estas ankaŭ la bela traduko kiun faris F.-ino Briggs el *La Forpaso de Arturo* de Tennyson, el kiu ni citos nur la jenajn versojn pri

. . . la insula valo Avilio,
kie ne falas hajl', nek pluv', nek neĝo,
nek iam blovas laŭte vent'; ĝi kuſas
feliĉa, bela, kun fruktarboj, kampoj,
kaj laŭboj per somera mar' kronitaj.

La Redaktoroj anoncas ke No. 13, aperonta en Marto, enhavos tradukon el la rusa lingvo de verketo de la fama Puškin, *La Avara Kavaliro*. La tradukinto estas S-ro G. Zaletov, el Saratov (Ruslando).

OFICEJA BABILADO.

Kontribuata de la Oficistaro de la B.E.A.

Nova Katalogo.—Ĉiu membro kaj abonanto ricevos kune kun tiu ĉi numero ekzempleron de nova eldono de nia katalogo. Ni tre fieras pri nia katalogo, ke je ĉiu nova eldono ĝi fariĝas pli kaj pli granda. Ĝi efektive estas unu el niaj plej bonaj propagandiloj. Ĉiu kiu deziras pluan ekzempleron, skribu al la Administranto de B.E.A., kiu plezure ĝin sendos.

Novajoj.—La sinjorinoj ĝojos pri alveno de nova, tre malkara, insigno, aparte taŭga por ili. Verda emajlita stelo sur blanka fundo estas ĉirkaŭata de *imitaj* briliantoj. La kosto, estante nur 1\$. 8p. afrankite, bedaŭrinde ne permisas verajn briliantojn! Por sinjoroj ni ĵus akiris provizon de aluminiaj Cigareduoj (1\$. 8p. afrankite) kaj Tabakuoj (2\$. afrankite), ĉiu portanta verdan stelon kaj enskribiĝon *Vivu Esperanto!*

Mendoj por Novaj Libroj.—En Februaro lasta ni anoncis pri aparta aranĝo, per kio legantoj povas certigi al si nepran ricevon de ĉiu nova verko eldonata. Rezulte el tio kelkaj personoj profitis la okazon, kaj sin registrigis. Por pligrandigi nian liston, ni proponas avantaĝon sole al tiuj kiuj registrigas. Al ĉiu tia, ni sendos novajn verkojn tute *afrankite*, kiom ajn granda aŭ peza estas la verko. Por pluaj detaloj skribu al la Administranto de B.E.A.

Necesa Singardemo.—La kortega amuzulo de franca reĝo plendis al sia estro, ke unu el la kavaliroj estis minacinta mortigi lin. "Se li faros tion," la reĝo konsolis, "mi pendigos lin kvin minutojn poste." "Tiuokaze mi preferus, via reĝa moŝto," rediris la amuzulo, "ke oni pendigu lin kvin minutojn antaŭe."

Reveno en la Mondon de l' Vivantoj!—Ni ĝojas diri, ke nia malnova amiko, S-ro Harald Clegg, iama Sekretario de la B.E.A., revenis Londonon, post sesjara servado en Francujo ĉe la K.U.J.V. kaj la armeo. Ni plezure anoncas, ke li estas sana kaj sendifekta, ankoraŭ fraŭla, kaj alskribbebla ĉe 17, Hart St.

Malnovaj Gazetoj.—Restas sur niaj bretoj ankoraŭ kelkaj miloj da malnovaj ekzempleroj de "B.E." La spaco, kiun ili okupas, estas urĝe bezonata por aliaj objektoj, sed ni domagus ilin detrui, kaj preferus ilin disdoni por propagando. Ni do proponas sendi al ĉiu petonto tiom, kiom li deziras, kontraŭ nura pago de la afranko, t.e., 1\$. 3p. por ĉiu 100 ekz. Skribu al B.E.A., kaj marku la koverton "Malnovaj B.E."

B.E.A. OFFICIAL NOTICES.

Affiliated Groups.—The Secretaries of Affiliated Groups are reminded that under the new Articles of Association adopted at the last Annual Meeting it is necessary in order to affiliate to the Association that a Group have a minimum of ten members. The minimum under the former Articles was seven members, and it is hoped that Groups which would otherwise be unable to continue their affiliation will make every endeavour to increase their membership in order to continue to support the Association.

Delegate Councillors.—The Secretaries of Affiliated Groups are reminded that each Affiliated Group has the right to appoint a Delegate Councillor. As it is proposed to hold Council Meetings in different parts of the country, and not always in London, Delegate Councillors will in future have more opportunities of attending Council Meetings. Every Group, therefore, which has not yet appointed a Delegate should do so as soon as possible, and notify the Secretary of the Association of the appointment. The Agenda for each meeting of the Council is circulated beforehand, and Councillors thus have the opportunity of sending in the views of their Group on the subjects to come up for consideration.

Unaffiliated Groups.—Members of the Association who are also members of Groups not affiliated to the Association are asked to urge such Groups to take advantage of the New Year to affiliate to the Association, and thus help to strengthen the movement and the Central Organisation. Groups to affiliate must have a minimum of ten members, and the affiliation fee is calculated at 6d. per member per annum. A copy of the *British Esperantist* is supplied each month to affiliated Groups, discounts on book purchases are given, and advantages offered on supplies of propaganda literature and in other ways.

Guarantee Fund, 1922.—As in previous years, guarantees to meet any deficit on the working of the B.E.A. are invited both from private individuals and also from groups. Sums guaranteed should be multiples of 5s. Forms of guarantee can be had on application to the Secretary of the B.E.A.

NEW DELEGATE COUNCILLORS.

Glasgow (St. Rollox), JAMES C. DICKSON; Letchworth, Miss E. YOUNG.

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—"If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member."

Miss SELMA BARTHELS, *The Newlands, Salisbury Road, Carshalton, Surrey*; NELSON ERNEST SCOTT, 24 Lumley Road, Horley, Surrey; HOWARD STAY, "Sunnyside," Woodside Road, Bournemouth; Miss KATHLEEN CLAMP, 133 Northcote Road, London, S.W. 11; Mrs. FLORENCE LOUISA FISH, 42 Hart Street, Southport; Rev. THOMAS HAWKES, *The Rectory, Watchet*; SAMUEL RICHARDS, 21 Treville Street, Plymouth; SYDNEY J. SMITH, 45 High Street, Sydenham, London, S.E. 26; CHARLES STEEL, 206 Victoria Park Road, London, E. 9; Miss MONICA WAYMOUTH, Whangarei, Kew, New Zealand.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

PERCY WHITTLE, Whangarei, New Zealand; JOHN DOWLE, London.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*ARTHUR REES FAIRBAIRN, Ryton-on-Tyne; *FRED CLEGG, Newcastle-on-Tyne; ETHEL MALLINSON, Barnoldswick, Yorkshire; *JANET ALICE NORTON, Liverpool.

* Denotes that candidate has passed with distinction.

Notice is hereby given that the next meeting of Council will be held on Saturday, 18th February, at 6 p.m. in the Offices of the Association, 17 Hart Street, London, W.C. 1, preceded by an informal meeting of Councillors and friends from 3 to 5 p.m. The agenda will be sent to all Councillors by post.

MONTAGU C. BUTLER, Secretary.

NASKIGO.

BUTLER.—Al Martha Amy kaj Montagu C. Butler, Dec. 6an 1921, filino, nomita Naomi Christina.

MORTOJ.

C. B. MABON.—Multaj legantoj malgojos pri la forpaso de tiu ĉi konata samideano, kiu okazis subite, la 26an de Novembro. S-ro Mabon havis 53 jarojn. Li estis fervora membro de la Esperantistaro en Glasgovo, sed lia nomo familiariĝis ankaŭ pli vaste pro liaj komponaĵoj, ekzemple la muziko por *La Gaja Migranto* de Zamenhof kaj tiu por la *Kantoj por Infanoj* de Applebaum. Por la Glasgova Societo li estis ĉiam preta doni sian helpon, metante malavare je ĝia dispono sian muzikan kaj tradukan talenton. Ne nur la Societo mem, sed la tuta brita samideanaro, deziras esprimi koran simption al la vidvino kaj filino de la perdita amiko.

ADAM ZAKRZEWSKI.—La polaj samideanoj, kaj kun ili la tuta Esperantistaro, funebras la morton, la 1an de Novembro, de tiu konata pioniro, kiu estis fama ne nur inter Esperantistoj sed ankaŭ en Polujo ĝenerale, kiel sciencisto—precipe antropologia kaj etnografia. En la pola lingvo li verkis *Historio de la Lingvo Internacia* kaj aliajn lingvajn verkojn, kaj li estos longe memorata inter ni pro lia *Historio de Esperanto* verkita en la lingvo mem.

FAKO DE KORESPONDO.

Tie ĉi estas presataj anoncoj de legantoj de la gazeto kiuj deziras korespondi kun aliaj Esperantistoj. Ĉiu anoncanto devas pagi 9 pencojn (aŭ 4 stampitajn respondkuponojn) por tri linioj, kaj tri pencojn (aŭ 2 stampitajn respondkuponojn) por ĉiu plua komencita linio. Ĉiu membro de la Brita Esperantista Asocio havas rajton je unu senpaga anonco. Bonvolu sendi anoncojn al la Sekretario de la B.E.A., 17 Hart Street, Londono, W.C. 1., kaj *skribu legeble*. Oni akceptas nenian respondecon pri eraroj kaŭzitaj de nelegebla skribmaniero.

1. Kilbirnie, Skotlando.—S-ro Robert Partridge, 8 Townhead, petas leterojn kaj p.k. por internacia programo de bontemplana logio 22 Feb., 1922.

2. Čehoslovakjo.—S-ro V. Brejnik, Libochovice, Ricgrova str. 247, dez. vendi p.k. de ĉehoslovakaj naciaj kostumoj.

3. Kiev, Rusujo.—S-ro P. A. Karuzin, Poštrestante—(do postrebovania), dez. korespondantojn precipe pri geografioj kaj kartografioj temoj.

4. Tveri, Rusujo.—S-ro V. Vtlakin, Sovjetskaja 22, dez. kor. pri geografio, pedagogio, Esp. movado.

5. Čehoslovakjo.—S-ro Gustav Vitek, drogisto, Polna, apud Jihlava, membro de "Klubo de bohemaj filatelistoj en Praha," dez. inter. p.m.

6. Petrogrado, Rusujo.—S-ro N. M. Safrarov, Spasskij per. 9, log. 77, dez. korespondi kun gesamideanoj.

7. Madrid, Hispanujo.—S-ro Mariano Mojado, Abascal 13, jiral A., baldaŭ deziros korespondantojn skoltajn por siaj skoltaj lernantoj.

8. Manchester, S., Anglujo.—S-ro E. C. Bowman, 21, Laurel Av., dez. koresp. kun ĉiulandanoj per il. p. k. (p.m. bildflanke). Por 12 p. k. vidajoj de ia lando li sendos 12 belajn vidajojn de Manchester.


LA JUNA STUDANTO

SUPPLEMENT TO "THE BRITISH ESPERANTIST."

N-RO 1.



JANUARO, 1922.



Competition for Boys and Girls. (Sixth Series) Conducted by Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95 Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those who obtain the highest number of marks.

N.B.—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in under an envelope, to save postage.

FIRST COMPETITION.

Postcards to be sent not later than 31st January.

(a) DIAMANTAJO.

- estas konsonanto.
- estas ripozejo.
- estas tre utila al homoj besto.
- estas frukto.
- estas konsonanto.

(b) TRAVORTO.

Mi estas en prov', sed ne en tent';
Mi estas en palp', sed ne en sent';
Mi estas en kost', sed ne en prez';
Mi estas en spar', sed ne en spez';
Mi estas en skrib', sed ne en verk';
Mi estas en glan', sed ne en kverk';
Al mi vi portas koron aman,
Kaj portas mi al vi la saman.

JUSTECO EN NUKSOSELO.

Kvinminuta Teatrajeto por Infanoj. De J. BAIRD.

SCENEJO.—Kampara vojeto tra arbareto, laŭlonge de kiu promenas du knabinoj.

ROLULOJ.—Tri knabinoj (au du knabinoj kaj unu knabo), kiu uzos siajn proprajn nomojn.

Jonjo. Ho, Manjo, rigardu! Kio estas tio, kušanta sur la tero?

Manjo. Kie?

Jonjo. Jen, tie. Ĉu vi ne vidas ĝin? Ho! mi kredas, ke ĝi estas bročo. (Sin klinas por ĝin levi, sed tuj sin retriras pro timo). Ho, ho!

Manjo. Nu, kio estas al vi, Jonjo?

Jonjo. Ho, gardu vin! Ne alproksimigu! Ĝi estas besto—ia rampema, aĉa besto. (Manjo, pli riskema, sin klinas por esplori). Ho! ne tuŝu ĝin, Manjo. Jen ĝi ekmovas sin. Ĝi eble vin mordetos.

Manjo. Stultulino! Ĉiam vi timas tiajn ajojn. Ho, ĝi tute ne estas besto! Ĝi estas nukso, kaj kia belega nukso ĝi ja estas! Nu, vidu, kion vi maltrafis, timemulineto (suprentenias la nukson aloge). La instruistino, kiel vi scias, ĉiam diras: "Kiu ne riskas, tiu ne gajnas."

Jonjo. Donu al mi mian nukson, Manjo (provus ekpreni ĝin el la mano de sia amikino).

Manjo. Via nukso! kia arroganteo! Ĝi estas mia nukso. Mi levis ĝin.

Jonjo. Sed ĝi estas mia nukso. Vi, avida knabino, donu ĝin al mi.

Manjo. Vi, sendube, la unua vidis ĝin, sed mi levis ĝin, kaj kiel vi scias, "Kiu trovas, tiu tenas." Do, ĝi estas mia, kaj mi intencas teni ĝin.

Jonjo. Sed mi trovis ĝin, kaj tial ĝi estas mia. Se mi ne estus elmontrinta ĝin al vi, certe vi estus preterpasinta ĝin.

Manjo. Kaj se mi ne estus levinta ĝin, vi estus forkurinta de la 'aĉa besto', kiel vi ĝin nomis.

Jonjo. Ho, vi malnobla, terura aĉulino! (ekploras). Ĝi ja estas mia nukso. (Eniras knabo aŭ tria knabino).

Knabo. Bonan matenon, amikinoj. (surprizite) Kio! Ĉu vi malpacas? Ĝuste kiel knabinoj! Ili neniam povas interkonsenti, kaj vi, Jonjo, ĉu vi ploras? Ho, kia infaneto!

Jonjo. (forvisante larmon kaj denove provante ekpreni la nukson).

Manjo. Ĝi ne estas ŝia nukso. Mi trovis ĝin. Ĝi estas mia.

Jonjo. Vi nur levis ĝin. Mi trovis ĝin, ĉar mi la unua ĝin vidis. Donu ĝin al mi. (piedfrapegas kolere).

Manjo. Sed vi timis levi ĝin, timemulineto.

Jonjo. Sed—

Knabo. (interrompante) Cesu malpaci, knabinoj. Mi decidu la aferon. La situacio estas, laŭ via diro, jene: Estis vi, Jonjo, kiu la unua ĝin vidis, ĉu ne?

Jonjo. Jes, mi—

Knabo. Kaj estis vi, Manjo, kiu levis ĝin, ĉu ne?

Manjo. Jes.

Knabo. Nu, estas evidente, ke ĝi apartenas al ambaŭ. Kial ne dividu ĝin?

Jonjo. Mi ne volas dividu ĝin. La tutu nukso apartenas al mi, kaj mi ne duonigas ĝin.

Manjo. Timemulinetoj ne meritas eĉ duonon. Gi tutu estas mia.

Knabo. Nu, donu ĉi tiun mirindan nukson al mi. (prenas ŝtonon, kaj per ĝi rompas la nukson en duonojn, kaj eltiras la kernon). Nu, Jonjo, vi la unua vidis la nukson, ĉu ne?

Jonjo. Jes.

Knabo. Jen (transdonante al ŝi unu duonon de la malplena ŝelo) via parto; kaj, Manjo, jen via, ĉar vi levis la nukson, kaj (mangonte la kernon) jen mia, ĉar mi decidis la disputon. Bonan tagon!

Jonjo kaj Manjo. Ki—a mal—just—ajo!

Manjo. (forirante kun Jonjo, brakon ĉe brako). Ne ĉagrenigu, Jonjo. Ni perdis nian nukson, sed ni ricevis lecionon: Ĉiam dividi niajn plezurojn kun aliaj; ĉar tre ofte okazas, ke, kion oni celadas konservi por si, tion oni entute perdas.

Snappy.